

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 511

MAJO 1948



ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



ANONCETOJ

Kosto : du pecnoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Brita oficiro serĉas postenon en Japanujo. Parolas hindustanan, germanan, kaj francan lingvojn. Korespondas hispane, itale. Stenografias angle. Leŭt. A. J. Cameron, National Bank of Scotland, Inverness, Skotlando.

Fr. Svanĉina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj: (1) Bredado de senkornaj kaprinoj laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur gis morto.

Kiuj deziras reprezenti la "Esperanta Film-Grupo"-n en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom, Nederlando.

Bonkore helpu la blindajn per donaco de alilandaj poŝtmarkoj uzitaj. Sendu al Frank Thurgood, Reprezentanto pro la Londona Asocio por la Blinduloj, 36 Lupus Street, Westminster, London, S.W.1, Anglujo.

Mi serĉas ilustritajn eldonojn de "Fabloj de H. C. Andersen" en ĉiuj lingvoj. Rekompence mi sendos librojn — ne nutraĵon. J. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, Hellerup, Danlando.

EKO - Centro K. Karger, (16) Driedorf - Dillkreis, Germanujo, interesiĝas pri filatelaj kaj korespondaj interrilatoj. Eldonas informilon, adresojn, kaj cirkulerojn pri libertempaj aferoj. Certe respondos.

S-ro Ron Bowes, Holywood Hall Sanatorium, Wolsingham, Co. Durham, Anglujo, deziras korespondi kun la tuta mondo.

Gegrupanoj de la Hagen E-grupo, komencantoj kaj progresintoj, deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj. Skribu al Erich Fischer, Grupprezidanto, (21b) Hagen (Westfalen), Eugen-Richterstr. 78, Brita Zono, Germanujo.

Kolektantoj atentu! Sendu al mi poŝtmarkojn de viaj landoj kaj tuj mi sendos al vi ilustritajn poŝtkartojn de Madejra Insulo. Luiz de Freitas, Banco da Madeira, Funchal, Madejro.

Kiu bonkora samideano denove sendos al mi iom da leterpapero? Richard Bohnert, (20a) Adenstedt über Alfeld (Leine), Brita Zono, Germanujo.

Franz Heidler, (16) Kleinkrotzenburg, Hauptstrasse 49, Amerika Zono, Germanujo, deziras interŝanĝi p.m. kun seriozaj pm-kolektantoj en ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Italujo—Milano, Via Lipari 8, Lovati Kern, sendas ĉien belegajn pursilkajn tukojn, kravatojn, brodaĵojn, muziknotojn, librojn, sunokulvitrojn.

Kuracistino deziras korespondi kun gekolegoj. Caldirola Alessandra, Viale Pasubio 14, Milano, Italujo.

Ake Florbäck, Mörbayvägen 14, Nynäshamn, Svedujo, estas 27-jara Esperantisto kiu deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Garantias respondon al ĉiu.

S-ro Fritz Thasler (antaŭe fervoja stacidomestro en Silezio) deziras propagandilojn por varbi la urbon Passau; ankaŭ liaj antaŭmilitaj korespondantoj skribu: (13b) Dobl post Bayerbach/Rottal, Niederbayern, Germanujo. (Anoncon presigis amiko Angla.)

Wien IX., Gabriel Katzianka, Wien IX, Rossauerlände 27, Aŭstrujo, interŝanĝas p.k.i. kaj pm. k.c.l.

Wien, Freidrich Biedler (filatelista grupo), Wien XV/101, Postfach 8, Aŭstrujo, interŝanĝas pm. kun tuta mondo.

Poŝtkartvespero. Vi certe ricevos respondon se vi el ĉiuj partoj de la mondo sendos pk. il. al niaj vesperoj, la 10an Majon kaj la 7an Junion. A. Wright, 38 Vaughan Street, Nelson, Lancs., Anglujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn tutmonde Johann Bjarnason, Nijlendugötu 11a, Reykjavik, Islando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. Josef Fischer, (21) Bochum i.W., Querenburgerstr. 109, Germanujo.

Deziras interŝanĝi leterojn kaj il. pk. kun la tuta mondo; respondo garantiata, S-ro Lauri Lehtola, Hämeenlinna, Alajoki, Finnlando.

26-jara metiisto deziras interkorespondadon kaj samtempe interŝanĝon de poŝtmarknovaĵoj. Bruno Bresin, Berlin NO55, Greifswalderstr. 228a, Germanujo.

Tutmonde deziras korespondi, krome interŝanĝi poŝtmarkojn Josef Engst, Rathaŭs, Ulm/Donau, Germanujo.

Kucharz Jozef, Rzeszów, Bernardynska 6, Pollando, antaŭ la milito loĝanta en Lwów, petas korespondon de ĉiuj antaŭmilitaj geamikoj, kaj bonvenigos novajn korespondantojn.

Mi deziras korespondi kun eksterlandaj Metodistanoj. Edmund Youngash, 44 Parkgate Road, Watford, Herts., Anglujo.

Poŝtmarkinterŝanĝo—Mi sendos 75–150 diversajn skand. se mi ricevos saman kvanton de vi. S-ro Juul Andersen, Silkeborgvej 17, Århus, Danlando.

Studento 23-jara deziras korespondadi kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu al Daniel Luez, S.P. 50.407, B.P.M. 510, Francujo.

Libro por korespondemuloj senpage. Informoj kontraŭ poŝtrespondkupono. Cerri, Esperanto-servo, Postal casella 89, Varese, Italujo.

Radomir Vrána, stud. gimn., Třída dr. E. Beneše, Podebrady, Ĉeĥoslovakujo dez. kor. esp. k.ĉ.l.

Gelernantoj deziras korespondi kun tutmondo. Skribu Lagorse, typographe, Route Saint-Ylie-Dole (Jura), Francujo.

Kontraŭ nedifektitaj poŝtmarkoj mi interŝanĝas Esperantistajn gazetojn; sendo garantiata. S-ro Romain Chambaz, 44 Rue du Haut-Pavé, Etampes (S. et O.), Francujo.

Belga Esperantista Turista Servo sendigas pere de oficialaj instancoj turistajn prospektojn kaj ĉiajn turistajn informojn (1 rk.) Garennes, 107 Boitsfort, Bruselo, Belgujo. Afranku filatele.

Jacqueline Gregoire, 68 Rue Camille Lemonnier, Bruselo, Belgujo, ŝanĝas turistajn prospektojn kontraŭ pm., il.pk. Afranku filatele.

Amatorfotografisto dez. korespondi tutmonde per il. pk. kaj interŝanĝi amatorajn fotojn kaj pm. La adreso estas Bengt Markling, Sparsör, Svedujo.

Fraŭlino, 21-jara, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj, letere aŭ per il. pk. Ĉiam respondos. Dorothea Poppleton, 429 Laceby Road, Grimsby, Anglujo.

Ni intencas aranĝi foiron por Esperanto. Por tio bonvole sendu bildpoŝtkartojn, prospektojn, kaj gazetojn Esperantlingvajn al la Junularrondo Esperantista, (22a) Düsseldorf, Eintrachtstr. 6, Brita Zono, Germanujo.

F-ino Josette Bories, 94 Rue Voltaire, Carcassonne (Aude), Francujo deziras tutmonde interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn.

Ĉu vi iros al Malmö?—Se jes, vojaĝu iom pli frue por ĉeesti la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør (Elsinoro), Danlando, nur 3 horojn de Malmö. Kurstempo: 17–24 kaj 24–31 de julio. Tie vi ekhavigos bonegan lingvan ekzercon antaŭ la kongreso. Prospekto havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Majo 1948
N-ro 511 (5)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅙ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

Ni ne volas paroli kiel Estraranoj ! Ni ne tedos vin per ciferoj ! Ni ne klarigos al vi la utilon de Esperanto ! Post la sukcesa Estrara kunsidaro en Rickmansworth ni deziras nur diri al vi kelkajn, simplajn, amikajn, samideanajn vortojn.

La Esperanto-movado bezonas vian helpon. Ne financajn rimedojn ĝi postulas de vi en la nuna momento, sed vian prudenton, vian oferemon, vian entuziasmon, Ni ĉiuj sciu kaj konsciu, ke Esperanto hodiaŭ ne estas tiom disvastiĝinta kiom ĝi meritas. Sed ni ankaŭ konsciu, ke grandparte ni mem kulpas pri ĉi tiu fakta stato. La milito sendube lasis siajn postsignojn. Ankaŭ la malfacilaĵoj en la internacia rilatado malhelpas nin. Tamen nia troa pesimismo, nia ofta skeptiko, precipe nia nesufiĉa agemo estas la ĉefaj radikoj de la tro malrapida disvastiĝo de la lingvo.

Se kelkajn objektivajn malfacilaĵojn ni ne povas flankenmovi, tamen nia amo al nia afero povas ilin transsalti. Kaj ĝuste tion oni devas nepre fari !

Ni do turnas nin al ĉiuj, kiuj sentas en si nur iom da idealismo kaj preteco labori por la afero.

Ni turnas nin al la Esperantista junularo, kies freŝo kaj dinamiko kapablas fari miraklojn ; ellernu mem perfekte Esperanton ; interkontaktu internacie almenaŭ skribe ; eniru en la komitatojn de niaj societoj ; fondu en ili apartajn junularajn sekciojn ; propagandu la lingvon inter viaj samaĝuloj ; instruu ĝin al viaj kolegoj kaj kamaradoj.

Ni turnas nin al malnovaj pioniroj ; restu fidelaj al viaj propraj idealoj, al nia komunaj celoj ; kompreneme rilatu kun la esperantista junularo ; transdonu al ĝi la taskojn, kiujn juneco pli facile realigas ; helpu ĝin ĉiurilate ĉar morgaŭ ĝi anstataŭos vin en la nobla lukto por neŭtrala Internacia Lingvo !

Ni turnas nin al tiuj niaj amikoj, kiuj perdis la esperon kaj forlasis niajn vicojn ; revenu al la movado, helpu ĝin per viaj spertoj kaj konsiloj ! Se via nuna elstara kaj respondeca pozicio en la socio malfaciligas al vi la aktivan ĉiutagan partoprenon en la giganta laboro por la Internacia Lingvo, subtenu ĝin tamen per via nomo ; kuraĝigu la aktivulojn per viaj vortoj ; solidariĝu kun niaj agoj !

Ni turnas nin aparte al niaj propagandistoj : se vi deziras agi por Esperanto, unue ellernu ĝin bone kaj perfektigadu senĉese ! Studu la lingvoscienccon ĝenerale ; adaptu viajn metodojn al la medio en kiu vi laboras ; evitu malseriozajn eksterajn efektojn kaj ne ridindigu nian aferon en la okuloj de la publiko ; memoru bone, ke Esperantismo ne estas sekto, sed grava socia movado ; tial ĉiam konvinkadu per science bazitaj argumentoj kaj ne per tro da flagoj kaj ĉiuspecaj insignoj ; direktu vian aktivecon al larĝaj popolamasoj, bezonantaj la internacian lingvon kaj ne perdu vian tempon penante ricevi ian favoran deklaron de unu persono !

Geesperantistoj ! Nia movado restariĝis en mondaj kadroj. Ni atingis organizan unuecon. La ĵus trastuditaj kaj proponataj ŝanĝoj en la Statuto de U.E.A. kreas larĝan idean bazon por kunlaboro de ĉiu esperantisto, akceptanta la demokratan principon de plena egaleco de nacioj kaj individuoj, kaj konsideranta la Internacian Lingvon instrumento de paco kaj amikeco inter la popoloj.

Surbaze de la solvita organiza problemo, surbaze de komprenemo, surbaze de niaj sesdek-jaraj tradicioj—ek al la laboro ! Al novaj bataloj, al novaj venkoj !

La movado bezonas ĉiujn ! Ne tial, ke ĝi estus tro malforta, sed tial, ke ĝi devas esti multe pli forta !

E. Malmgren, (Prezidanto), D-ro P. Kempeneers, (Vicprezidanto), H. Jakob, D. Kennedy, D-ro I. Lapenna, A. C. Oliver, P. Petit.

La Estraraj Kunsidoj

En Anglujo je Pasko la vetero estis ekster-ordinare bela, kaj verŝajne multaj el niaj legantoj ĝuis tre agrablan libertempon. La Estraranoj de U.E.A. ne estis tiel bonŝancaj, ĉar ili laboris dum tri tutaj tagoj por la bonfarto de nia Asocio kaj la movado Esperantista. Jen konciza raporto pri kelkaj eroj en la programo, sed ĝi povas doni nur malgrandan impreson pri la laboro farita ĉar pri multaj detaloj oni devos diskuti kun aliaj instancoj rilate al la plenumblo.

Financoj : La Estraro aprobis la agadon de la Centra Oficejo, kaj raportojn pri financoj, propagando, servoj, kaj aliaj aferoj. Ĝi aprobis ankaŭ budĝeton por la nuna jaro.

Universala Kongreso : Ĝi gratulas la Svisojn pro la sukceso de la kongreso en Bern. Tial ke oni ne povos okazigi kongreson en Nice, Francujo, laŭ atendo, oni akceptis inviton okazigi la kongreson en 1949 en Bournemouth, Anglujo. Bournemouth estas bela banurbo sur la suda marbordo (la *Angla Riviera*) kaj la kunvenloko devus esti tre alloga. La Estraro principe decidis favore al kongreso en Parizo 1950.

Kongreso en Malmö : Aranĝoj estas faritaj rilate al la komitatkunsidoj en la nunjara kongreso kiel ankaŭ pri la laborkunsidoj, kiuj verŝajne estos pli ol kutime interesaj.

Ferioklubo : La Estraro decidis ĉesigi tiun aranĝon, ĉar ĝi ne trafis la akcepton, kiun oni antaŭvidis.

Kongresa Licencpago : Laŭ la Statuto ĉi tio estas utiligebla por helpi al la eldono de ŝlosiloj kaj lernolibroj en landoj, kie la movado estas nova aŭ kie la enlandaj Esperantistoj mem ne povas aranĝi tian aferon. La Estraro decidis

doni helpon tian al Islando, Egiptujo, Palestino kaj Jugoslavujo.

La Petskribo : Nia kampanjo estas detale pristudita. Aranĝo estas farita, kiu espereble kovros la koston. La Estraro decidis, ke la findato de la Petskribo estu 31 de Decembro 1948, sekve de la granda sukceso de la kolektivaj subskriboj. Oni atendas, ke antaŭ tiu dato la membroj estos farintaj ĉion eblan por plenumi sian devon al la movado.

Statuto : Oni ekzamenis multajn proponojn pri ŝanĝoj en la Statuto kaj faris plurajn decidojn. Pri tiuj decidoj oni voĉdonigos la Komitaton kaj poste la Landajn Asociojn kaj la individuajn membrojn en landoj, kie ne troviĝas aliĝinta asocio. Se ni sufiĉe frue ricevos la rezulton, kaj se financaj rimedoj ebligas, ni publikigos la Statuton en la dua parto de la jarlibro 1948.

Gazeto : Pri tio multe da diskuto okazis. Ni esperas plibonigi ĝian enhavon, sed atentigas membrojn, ke ni ne povas pliampleksigi nian organon sen multe pli da membroj. Ni esperas, ke ĉiu donos sian helpon por fari nian organon inda parolilo de nia Asocio.

Propagando : Multaj proponoj estis ricevitaj. Kelkaj estis senutilaj kaj aliaj neefektivigeblaj, sed la Estraro diskutis ĉiun proponon. Ni rimarkigu, ke ni tre ofte ricevas propagandajn proponojn, kies efektivigo postulus milojn da frankoj, sed la proponintoj neniam indikas kiel ni trovu la monon. Kelkaj proponoj tamen estis interesaj kaj la kongresanoj en Malmö verŝajne aŭdos pri tiuj en la laborkunsidoj tie.

Delegitoj : La Komitato estis akceptinta novan regulon laŭ kiu oni devas esti estinta individua membro dum minimume unu jaro antaŭ la nomigo por la ofico de Delegito. Krome, oni notu, ke novaj Fakdelegitoj reprezentos nur unu fakon. Ni esperas, ke nunaj Fakdelegitoj helpas la Administran Centron per indiko pri tio, kiun fakon oni forigu el la registriroj.

Tiuj estas la aferoj precipe interesaj al la ĝenerala leganto, sed krom tiuj oni traktis dekojn da aferoj pri administrado, funkciado, k.s. kies celo estas la glata funkcio de nia maŝino por ke ĉiu membro ĝuu la servojn, kiujn la asocio disponigas al li. Kaj kompreneble, multaj gravaj aferoj estis principe akceptitaj, sed tiujn ni povos konigi al la membraro nur kiam la planoj estos tute pretaj. Sufiĉas diri, ke la kunsidoj estis verŝajne la plej bonaj kaj plej harmoniaj en la serio. Mi estas certa, ke la Estraranoj foriris kun sento de *bona tasko bone farita*, kaj tiuj, kiuj ĉeestos la kunsidojn en Malmö kaj aŭdos la raporton de la Estraro al la kongreso espereble havos similan impreson.

C.C.G.

LA PETSKRIBO

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 2-a de Aprilo :

Landoj			
Germanujo ..	1,213,998	Islando ..	4,348
Ĉeĥoslovakujo ..	1,031,464	Portugalujo ..	3,462
Norvegujo ..	459,692	Aŭstralio ..	3,370
Francujo ..	61,611	Nov-Zelando ..	2,540
Nederlando ..	47,024	Svisujo ..	1,946
Britujo ..	27,769	Egiptujo ..	1,825
Bulgarujo ..	21,992	Maroko ..	1,037
Svedujo ..	18,373	Grekujo ..	860
Aŭstrujo ..	14,356	Palestino ..	528
Jugoslavujo ..	14,138	Irlando ..	463
Italujo ..	11,531	Urugvajo ..	460
Polujo ..	9,714	Kanado ..	360
Danujo ..	9,108	Sud-Afriko ..	290
Usono ..	6,776	Hispanujo ..	276
Brazilo ..	6,711	Hindujo ..	236
Belgujo ..	6,614	Ceteraj Lokoj ..	594
Finnujo ..	6,354		
Argentino ..	6,248	sumo ..	3,002,228
Hungarujo ..	6,160		
Okupoj			
Artistoj ..	2,018	Navigaciistoj ..	1,125
Delegitoj Komunumaj	511	Parlamentanoj ..	242
Dentistoj ..	553	Policistoj ..	2,325
Desegnistoj ..	2,083	Presistoj ..	3,237
Dommastrinoj	44,132	P.T.T.-istoj ..	8,791
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,132	Religiistoj ..	1,494
Elektristoj ..	2,955	Sciencistoj ..	1,180
Farmaciistoj ..	1,258	Sindikataĉefoj ..	452
Farmistoj ..	9,933	Soldatoj ..	3,328
Hotelistoj ..	1,662	Studentoj ..	31,903
Inĝenieroj ..	13,472	Ŝoforoj ..	2,322
Instruistoj ..	18,332	Ŝtatoficistoj ..	7,602
Juristoj ..	1,647	Teksistoj ..	1,350
Ĵurnalistoj ..	1,156	Transportistoj ..	357,128
Komercistoj ..	56,742	Urboficistoj ..	3,572
Konstruistoj ..	6,277	Vendistoj ..	8,991
Kuracistoj ..	4,336	Vestistoj ..	6,041
Laboristoj ..	21,278	Diversaj ..	2,349,392
Lingvistoj ..	319		
Metiistoj Diversaj	21,957	sumo ..	3,002,228

Por ke oni povu juĝi la valoron de la kolektiva subskribo, ni hodiaŭ publikigas la liston de la ĝis nun ricevitaj. La listo estas impona kaj pensiga kaj klare indikas la vojon al la venko. Ĉiuj samideanoj, kiuj laboris por akiri tiujn gigantajn ciferojn, meritas nian plej varman gratulon, sed ni malatentus nian devon, se ni ne anoncus la imponan kontribuon de Th. Kilian en Třebič, Ĉeĥoslovakujo. Ne kontenta per sia rekorda *individua* cifero de unuopaj subskriboj—5068—S-ro Kilian, laŭ propra konfeso ekĵaluzis pro la grandaj ciferoj de aliaj landoj, kaj . . . akiris tiun de SOKOL—unu milionon da subskriboj ! Ni estas certaj, ke la tutmondaj samideanoj kuniĝos kun ni je esprimo de sincera danko kaj gratulo al nia nelacigebla kunlaboranto.

Jen detaloj de la Kolektivaj Subskriboj ĝis nun ricevitaj.
(Ni listigas nur tiujn kun mil aŭ pli).

Oblastní velitelství Junáka (Teritoria stabo de Skoltoj) ..	Ĉeĥoslovakujo	2,100
Bayerischer Gewerkschaftsbund Ortsausschuss München (Bavara Sindikato Komitato München) ..	Germanujo ..	127,360
Sozialdemokratische Partei Deutschlands (Socialdemokrata Partio de Germanujo) ..	Germanujo ..	119,863
Arb. fagl. Landsorganisation (Laborista Faka Land- Organizo) ..	Norvegujo ..	440,000
Oslo Sporveisbetjenings forening (Tramista Asocio en Oslo) ..	Norvejo	2,100
Løten Samvirkelag (Koopera Societo, Løten) ..	Norvegujo ..	1,076
Norges Blindforbund (Nacia Asocio de Blinduloj)	Norvegujo ..	1,167
Touristenverein "Die Natur- freunde" (Turista Asocio "La Natur- amikoj") ..	Aŭstrujo	4,600
Ortsausschuss der Gewerkschaften Wuppertal (Federacio de Sindikatoj) ..	Germanujo ..	54,000
Deutscher Gewerkschaftsbund, Bezirk Niedersachsen, Der Bezirksvorstand (Germana Sindikata - Ligo, Distrikto Niedersachsen)	Germanujo ..	512,600
Vorstand der Eisenbahner- Gewerkschaften (Estraro de Sindikatoj fervoj- istaj) ..	Germanujo ..	310,000
Sokol ..	Ĉeĥoslovakujo	1,000,000
Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Francais (Unuiĝo arta kaj intelekta de fervojistoj francaj) ..	Francujo	28,000
Bayerischer Gewerkschafts-Bund Oberbayern (Suprabavara Sindikata Komitato) ..	Germanujo ..	59,859
Jungsozialisten in der spd. Landesausschuss, München (Junsocialistoj, München) ..	Germanujo ..	5,936
Sumo (Jam enkalkulita en la tuta sumo) ..		2,668,661

Grava subskribo ! Ni volas ankaŭ ĉi tie gratuli niajn polajn samideanojn pro grava atentinda sukceso. Ni aludas pri akiro de la subskribo de S-ro Józef Cyrankiewicz, Prezidanto de la Pola Respubliko. Ni povas esti ĝojaj, ke du land-prezidantoj (ankaŭ tiu de Francujo) jam apogas nian kampanjon.

Per ĉi tiuj venkoj estas evidente, ke la tereno ankoraŭ ne estas eluzita, sed restas fekunda por tiuj, kiuj celkonscie klopodas kulturi ĝin. Do, denove al la celo !

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Brazilo

Fervore agas la radio-amatoroj de São Paulo por popularigi Esperanton en la mallongonda komunikado. Ĉiufoje, kiam oni sendas QSO (informon pri kontakto) oni demandas, ĉu oni parolas Esperanton, kaj aldonas, ke tiu lingvo estas la plej praktika por radio-komunikado. Oni raportas, ke kiam oni finis parolon pri Esperanto en la radio-komunikoj, tre ofte aliaj aŭskultantoj kontaktas por peti plian informon.

En São Paulo la amatoroj kunvenas ĉiusemajne kaj instruas Esperanton al radio-amatoroj, kaj radio-komunikadon al Esperantistoj. En la rondo troviĝas 32 radio-amatoroj. Sekretario estas Luiz Bolivar Fosca—PY2AGI. São Paulo.

Ĉeĥoslovakujo

La 3-a Somera Esperanto-lernejo okazos en Doksy apud Macha-lago 17-an ĝis 31-a de Julio 1948. Antaŭtagmeza instruado. Eksterlandanoj, kiuj estas kore invitataj, havos okazon kunigi la viziton al Doksy kun tiu al Sokol-kongreso en Praha, kiu okazos unu semajnon pli frue. Petu informon ĉe Karel Šolc, Železán 41/I, MLADA BOLESLAV, Ĉeĥoslovakujo.

Danujo

Dana Esperantista Komun-Komitato sendis al la dana registaro 12-an de Marto 1948 kaj al 226 parlamentanoj detale presitan leteron en kiu oni atentigas pri la gravaj avantaĝoj de Esperanto en multaj sferoj de internacia aktivo. La Komun-Komitato prezentis kvar proponojn:

(1) Oficiala Dana subteno ĉe UNO kaj/aŭ UNESCO pri proponoj favoraj al Esperanto en la lernejo. (2) Reciproka konvencio inter skandinaviaj landoj (kaj Aŭstrujo) pri deviga instruado se la aliaj promesas simile agi. (3) Faciligoj en la dana kodo, ke Esperanto estu enkondukebla devige aŭ fakultative tie, kie gepatroj, lokaj aŭtoritatoj, aŭ instruistoj deziras. (4) Asigno de konvena sumo por instruistaj kursoj.

Oni aldonis slipon por la petskribo al UNO kaj demandaron pri la sinteno de la unuopaj parlamentanoj. Speciale informan materialon oni sendis al la ministroj, partigvidantoj, eventualaj debatontoj, kaj ĉiuj pedagogiaj gazetoj.

En oportuna momento oni esperas agi per la socialdemokrata parlamentano Poul Hansen, Svendborg, Esperantisto.

Estus tre helpe, se oni apogus ĉi tiun agon per simila agado en la respektivaj parlamentoj diverslande.

Germanujo

Radio München, stacio de la usona militista registaro 405m. kaj 48.70m., dissendos Esperanton ĉiun duan Sabaton je la 14-a horo MET. La unua dissendo, 17-an de Aprilo, estos kurso. Sendu gratulleterojn al Radio München, Kultur-abteilung, München Rundfunkplatz 1, Bavarujo, Germanujo.

La Prezidanto de la Bavara Parlamento, D-ro Michael Horlacher, akceptis la Honoran Prezidantecon de la Junular-Kunveno Esperantista en la Alpoj, kiu okazos post la Kongreso en München.

Al la Germana Esperanto-Kongreso en München, Pentekoston, jam aliĝis 1800 personoj inter kiuj estas centoj da eksterlandanoj el 15 landoj.

Tuj post la unua eksportfoiro Hannover en Septembro 1947 kelkaj samideanoj komencis laboron por varbi la komercistojn por Esperanto. Oni volis precipe havigi la simpation de la foirestraro, kaj tiucele skribis al 230 komercistoj en 35 landoj por ricevi ties apogon. La plimulto el tiuj jam skribis al la foiro por ricevi informon kaj tio pligrandigis la intereson de la estraro pri Esperanto tiel, ke la ĉefestro jam promesis sian apogon. La fakkomitato ricevis tre interesan materialon de S-ro R. Levin en Lyon, kies vigla artikolo *Komerco kaj Esperanto* multe impresis la koncernajn instancojn. Estas espereble, ke la foirkomitato disponigos standon de Esperanto. Gratulinde estas, ke la societo en Hannover varbis por la foiro 400 eksterlandajn Esperantistojn.

Gvatemalo

La nova delegito de U.E.A. en Guatemala Urbo en Gvatemalo, Centra Ameriko, klopodas pri starigo de internaciaj komunumoj en tiu lando. Li jam interrilatis kun la oficialaj instancoj kaj oni favore rigardas la projekton. La landestraro donos facilajojn al la enmigrintoj.

Se troviĝas Esperantistoj, kiuj deziras migri en Centran Amerikon por vivi komune, labori fratece kaj pace, enkonduki novajn industriojn, krei urbon internacian en la centro de la Amerikoj, tiuj sin turnu al la delegito, S-ro Jules Bonge, Posta Restante, GUATEMALA Cd., Gvatemalo, Centra Ameriko. Prefere skribu aerpoŝte.

Hungarujo

La Hungara Instru-ministerio eldonis novan instrukcion laŭ kiu Esperanto, inter aliaj studobjektoj kiel ekzemple la latina lingvo, muziko, k.s., povas esti nedevige instruata en la ĝeneralaj lernejoj (por 10–14-jaraj infanoj). Oni skribu seriozajn gratulojn (ne sur bildkartoj!) al la

ministro, D-ro Gyula Ortutay, Budapest, Vallás-és Közokt. Miniszterium, kaj al la ŝtatsekretario, D-ro György Alexits, sama adreso.

Je la fino de oficialaj kursoj en Budapest, 20 geinstruistoj faris ekzamenon. En oficiala kurso anoncita de la instruministerio en Budapest, aliĝis pli ol 100 instruistoj kaj pedagogoj.

Al Nacia Skolta Tendaro okazonta apud Budapest dum la somero ĉi-jare, oni invitas ankaŭ alilandajn skoltojn. Interesatoj skribu al: Hungara Skolta Asocio, Budapest V, Nagy Sándor u. 6, Hungarujo.

P.B.

Italujo

En Milano funkcias 11 Esperanto-kursoj jene: 3 kursoj en vespera komunuma lernejo por fremdaj lingvoj kaj turismo (Esperanto estas deviga fako); 2 kursoj en teknika ŝtatlernejo komerca (nedevice); 1 kurso, en la sama lernejo, por instruistoj; 1 kurso en popollernejo, 6-a klaso (nedevice). Tiujn 7 kursojn gvidas Prof. Piatti. Okazas 2 kursoj vespere en komunuma lernejo por fremdaj lingvoj. Gvidas Prof. Pugno. Kaj 2 kursoj en privataj rondoj, kiujn gvidas S-ro Quarone.

Japanujo

Jam en nia Februara numero ni donis mal-longegan sciigon pri revigliĝo de la japana movado. Venis ankoraŭ nova informo. En 1945 okazis la unua postmilita kongreso de japanaj Esperantistoj en Osaka kaj tie la neŭtralaj kaj laboristaj tendencoj decidis por komuna farto sin kunigi. Nur unu kondiĉon oni starigis: la principon de kontraŭ-faŝismo kaj kontraŭ-ŝovinismo. La novan organizaĵon oni konfirmis en la kongreso de 1946 kie oni formale starigis *Japana Esperantista Asocio* (JEA), kiu sin okupas precipe pri la propagando kaj praktika aplikado de la lingvo. Tie estis decidite, ke *Japana Esperanto-Instituto* (JEI) restu sendependa organizaĵo, kiu sin koncernu pri la teoria flanko de la lingvo, k.s. Tio estis provizora aranĝo kaj oni jam esperas likvidi la ĝenan duecon en la movado kaj reunuigi ĉiujn faktorojn.

La pasintjaran agadon karakterizis klopodado propaganda, kaj en Osaka oni instruas Esperanton en deko da lernejoj, ĉu devige, ĉu kiel laŭvolan temon, kaj en multaj fabrikejoj troviĝas rondetoj de samideanoj. La plej grava malhelpo estas manko de kontakto kun la ekstera mondo, kaj ekzistas granda *soifo* por korespondado kun samideanoj en diversaj partoj de la mondo. Kelkaj el la malnovaj samideanoj jam entreprenas literaturan agadon, kaj estas espereble, ke tre baldaŭ ni povos vidi kontribuojn el la mal-proksima oriento al nia internacia literaturo.

(el leteroj)

Nederlando

La Asocio de Nederlandaj Scienculoj-Esperantistoj kunvenis 28-an de Februaro en la astronomia observatorio en Utrecht. La prezidanto D-ro H. A. A. van der Lek malferme paroladis kaj emfazis la gravon de konversacio en Esperanto por ĉiam doni pruvon, ke Esperanto vivas. Li emfazis, ke pruvo dependas ne de historia deveno sed de la ĉiukampa aplikado de la lingvo.

Post diskutoj pri organizaj aferoj, D-ro G. F. Makkink prelegis pri Nomdonado en Esperanto al Bestoj kaj Plantoj. Li traktis la du metodojn: la fonetikigan radikimportan metodon kaj la tradukan metodon. Li montris kontraŭojn de nura Esperantigo de sciencaj nomoj, kaj pledis por konservado de folkloraj valoroj en la naciaj popolnomoj per traduko laŭ principo de internacieco.

Svisujo

La 13-an kaj 14-an de Marto la grupo en Thun faris la aranĝojn por la ĉiujara svisa Esperantotago. Partoprenis 60 gesamideanoj sub prezido de S-ro F. Liechti en salono de la urbdomo.

Oni traktis multajn rutinajn kaj organizajn aferojn kaj menciinde estas, ke oni decidis starigi kurson por instruistoj por provi forigi gravan mankon en la movado tiulanda.

Oni aprobis rezolucion de apogo al la sinteno de UEA rilate al la neŭtrale politika principo de tiu organizaĵo kaj esprimis sian ĝojon pri la bona funkcio de la nova kunfandiĝinta asocio.

O.W.

Urugvajo

La Montevidea gazeto *El Pais* en sia numero de la 29-a de Januaro 1948 informis ke la *Federación Uruguaya del Magisterio* (Urugvaja Federacio de Geinstruistoj) la antaŭan vesperon faris jenan gravan decidon en formo de rezolucio:

“La Urugvaja Federacio de Geinstruistoj esprimas la deziron, ke Esperanto estu akceptata oficiale de UNO kaj UNESCO kiel neŭtrala kaj facila lingvo, kun celo ke ĝi servu kiel helpa lingvo por faciligi la internaciajn interrilatojn kaj plifirmigi la ĉiuspecajn ligilojn inter ĉiuj popoloj, kaj kiel antaŭpaŝo por forigi la lingvajn barojn kiuj dividas la homaron.”


“Dum ĉi tiu akcepto de Esperanto ne efektiviĝos, tiu ĉi Federacio postulas por la hispana lingvo, kiel lingvo parolata de dudek nacioj, la nediskuteblan rajton figuri ĉiukaze inter la oficialaj lingvoj de ambaŭ universalaj institucioj.”

La rezolucio estis unuanime aprobita. La aŭtoro de la propono estis Prof. Manuel Fernández Menéndez, kaj ĝi estis studata de komitato, kiu favore informis pri ĝi.

M.F.M.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***La Evangelio laŭ spiritismo** : de Allan Kardec. El franca trad. I. Gomes Braga. Eld. Brazilia Spiritisma Federacio. 19 × 13.5 cm. 432 p. prezoj : broŝ. 8ŝ. 6p., bind 10ŝ. 6p., duonleda 23ŝ., afranko 9p.

Kun la penso pri *La Libro de la Spiritoj* ankoraŭ freŝa en la memoro mi ekzamenis kun vigla intereso ĉi tiun novan verkon el la sama eldonejo. Ni havas la saman unuarangan teknikon ĉe preso kaj bindo, vere belan volumon, kies ekstera aspekto tuj allogas. Tio precipe validas pri la luksa eldono, kiu estas belega kaj bongusta ekzemplo de la bindista arto. Jen libro kiu laŭ materiala vidpunkto povas ornami kiun ajn kolekton.

Pri la traduko, la rimarkoj, kiujn mi faris pri *La Libro de la Spiritoj* estas uzeblaj ankaŭ ĉi tie. La lingvo estas en modela, bela, klasika stilo, facilflua kaj klara. Ke al ĉiuj Esperantaj manuskriptoj oni apliku tian kompetenton kaj tian antaŭzorgon !

Mi konis ateistojn, kiuj legis la anglalingvan Biblion nur pro la klasika lingvo tie troviĝanta, kaj min fortege trafas la paralelo kun ĉi tiu nova kontribuo al nia literaturo. En multaj rilatoj ĉi tiu verko rajtas lokiĝi apud la unuaj klasikoj de Esperanto. La tradukinto profitis de la tempopaso kaj dum li konservis ĉion bonan de la unua periodo, li feliĉe por ni rezignis pri la eraroj, naskitaj el nematuro, de tiuj unuaj fundamentaj ŝtonoj de nia literaturo.

Recenzi la enhavon estas tasko nefacila, pro kaŭzoj, kiujn mi jam antaŭe aludis en kritikoj pri spiritismaj verkoj. Ĉiu kristana sekto bazas sian doktrinon sur interpretado de la Evangelio, kaj unu el la kuriozaĵoj por la ne-kristano estas tio, ke oni povis atingi tiel multajn kaj tiel diversajn konkludojn el tiu interpretado, kiu cetere en la daŭro de la pasinta jarmilo naskis antagonismojn kaj malpacojn, kiuj per altrudo de sufero kaj mizero al milionoj da homoj absolute kontraŭas la esencon de la instruoj en la Evangelio. Preskaŭ ĉiu sekto akuzas la ceterajn pri misinterpretado. Ankaŭ ĉi tiu interpretado ne estas escepto. Tio tamen kio estas escepta pri ĉi tiu interpreto, estas la fakto ke oni dokumentis la diversajn partojn de la Evangelio per komunikoj de medioj en tranco, kaj tre multaj el la komentarioj portas nomojn mondkonatajn. Pri la validado de tiuj komunikoj juĝos la legantoj mem. En tiu rilato eble estos permesate al mi rimarkigi,

ke estus interese scii, kiom la persono de la medioj influis la komunikojn. Ekzemple, nenie ni trovas en ĉi tiu libro mencion pri la plej grava premiso el ĉiuj ; t.e. pri la aŭtentiko de la Evangelio. La verko entute verŝajne implicas tiun aŭtentikon, sed estas notinde, ke en la tempo, kiam tiuj komunikoj estis farataj, (ĉirkaŭ 1860) la konstatoj de instruitaj teologoj, ke ekzistas gravaj duboj pri la aŭtentiko de multo en la Evangelio mem, ne estis ĝenerale sciataj.

Estas certe, ke multaj nekristanoj ne volos akcepti la admonojn pri rezignacio kaj asertos, ke tio estas la familiara kanto de la eklezio, kaj eĉ se oni ne estas ekstrema materialisto, oni rajtas kritike ekzameni la asertojn, ke utilas akcepti aferojn tiaj, kiaj ili estas, ke la suferoj kaj mizeroj de la tero estas rimedoj de "elaĉeto" pro pekoj faritaj en antaŭaj ekzistoj. Ĉu la argumento, ke animo naskiĝis en korpo de kriplulo por elaĉeto, devas haltigi la klopodojn rektigi la torditajn membrojn de tiu kompatindulo ? La verko ŝajne ignoras la fakton, ke la plimulto de la mizero kaj sufero sur la tero estas trudata al homoj, kiuj neniel respondas pri tio. Ekzemple, la suferantoj en milito plejofte ne estas la homoj kiuj kaŭzis la militon.

Tamen, kiel mi diris pri *La Libro de la Spiritoj*, ankaŭ ĉi tie troviĝas multe da saĝa konsilo, multe da prudento rilate al la bona vivo, kaj oni ne povas nei, ke se ĉiuj homoj sekvus la moralajn principojn ĉi tie prezentitajn, ja baldaŭ foriĝus la medioj en kiuj malfeliĉo, malsato kaj mizero floras.

Ĉi tiu verko estas leginda kaj rekomendinda. Neniu serioza teologo povas ignori ĝin, kiom ajn oni kritikas la konkludojn, kaj estas tre certe, ke multaj homoj konfuzitaj inter la animaj konfliktoj, la spiritaj maltrankviloj, kaj la moviĝantaj sablaĵoj de la homa vivo ĉi tie povos trovi orienton, firman rokon de gvido, helpo kaj konsolo.

M.S.

Ricevitaj : **Bildkarto** montranta la lokojn, kie troviĝas U.E.A.-delegitoj en Bulgarujo. Prezo 2 pecoj por 1 rpk. ; kaj **Bildkarto pri Paco**, sama prezo, ĉe Eldono de Esperanto Kulturo-Servo, Jolsva-u. 4, BUDAPEST III, Hungarujo.

Meksikio : teksto de la filmstrio N-ro 437/9. Eldono de la Esperanto Film-Grupo en Bergen-op-Zoom, Nederlando. Per ĉi tiu nova kajero la filmgrupo atingas altan nivelon de lingvo-uzo kaj oni devas gratuli la kompilintojn pro interesa kaj modela prezento de neordinara vojaĝbildaro. Prezo de filmstrio kaj teksto kune : 13¼ ŝilingoj anglaj, ĉe la eldonistoj Esp. Film-Grupo, Antwerp-scheestraat 45.

***Lernu Esperanton :** de Daniel Quarello ; eld. Quarello et Cie. broŝ. 19.5 × 14 cm. 31 p. prezo 1ŝ. 8p. afrankite.

Je konsidero pri internacia lernolibro necesas starigi normon, kriterion kiel eble plej objektivan, kun kiu oni povu fari komparon. Necesas difini kio estas la celo de tia libro kaj kia ĝia rolo. Ĉiaj lernolibroj devas havi la unuan kaj ĉefan celon prezenti kaj lernigi al la studanto la elementojn de la gramatiko ; sed lernolibro destinita por internacia publiko devas havi, laŭ mi—kaj mi kredas, ke tio ne estas pure subjektiva vidpunkto—pli vastan funkcion. Per nura prezento de la gramatikaj elementoj tia lernolibro farus ne pli ol Esperanta lernolibro en nacia lingvo, kaj efektive plenumus la taskon ne tiel bone kiel tiu lasta. Kiam studanto konsultas lernolibron verkitan en Esperanto, li evidente jam iris preter la elementan stadion ; alie li ne povus legi ĝin. Li do serĉas ion pli seriozan, pli profundan ol la elementojn. Li serĉas, se mi bone komprenas lian sintenon, normigon de lingvo-uzo, kunordigon de ŝajne konfliktantaj vidpunktoj, orientigon pri tiu kaj ĉi tiu interpreto de reguloj, sed li nepre *ne serĉas nur la opinion de la aŭtoro.*

Lernu Esperanton estas nur broŝureto, sed laŭ indiko sur la unua paĝo, ĝi estas ekstrakto el pli ampleksa verko, kaj mi tial pli detale kaj pli zorge traktas ĝin, ol ĝi supraĵe ŝajne meritas. La aŭtoro tre detale ilustras la diversajn parolpartojn, kaj la leganto certe ne miskomprenos la funkcion de la respektivaj eroj traktitaj ; estas egale certe, ke li jam konis tiun funkcion antaŭ ol konsulti la verkon, lerninte ĝin en sia kurso aŭ en sia lernolibro, kiel komencanto.

Eĉ en ĉi tiu mallonga ekstrakto troviĝas dube bonaj kaj evitindaj uzoj. La senescepta uzo de *de l'* tra la tuta libro estas afero de gusto, sed ŝajnas nesekvinda modelo en verko sen poezia karaktero. Mi mem uzus *besto* ĉie kie troviĝas *animalo* (plurfoje), kaj la aŭtoro spitas la Zamenhofan konsilon, cetere bonan (Lingva Respondo 49) per sia *Daŭru analizi* p. 15 kaj *daŭras senti* p. 17.

Malgraŭ iuj meritoj, kiujn la verko posedas, mi opinias, ke ĝi ne konformas—almenaŭ en la nuna formo—al la bazaj postuloj, kiujn mi starigis en la komenco.

M.S.

Kio estas Soci-Kredito ? 8-paĝa broŝuro pri ĉi tiu nova solvo de niaj ekonomiaj problemoj. Nepre havebla de ĉiu, kiu havas intereson pri la financaj renversiĝoj de nia epoko, do, de ĉiu inteligenta homo. Prezo 6p. aŭ 2 rpk. ĉe The Social Credit Co-ordinating Committee, Gordon House, Carrington Street, NOTTINGHAM, Anglujo.

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.00–17.15	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espér-artistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00–21.15	Praha. 49.92m. P.
Dimanĉo	15.00–15.15	Sveda Radio. 19.80m. kaj 27.83m. I. pri la 33a Universala Kongreso. (Nur la unuan Dimanĉon de la monato)
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	17.30–17.40	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	21.00–21.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato).
	23.30–23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45–21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	17.45–18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	13.00–?	München. 405m. kaj 48.70m. K. (ĉiun duan sabaton). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Trenčin, Slovakujo

Slovakotour en urbo Trenčin, Ĉeĥoslovakujo, ĵus eldonis beletan kajeron nacilingve kun Esperanta teksto. Oni sendas ĝin senpage kontraŭ peto al ĉi-supra adreso.

Budapesta Foiro

okazos dum Majo, 5-a ĝis 17-a. Kiel kutime, la direkcio eldonis reklamilojn en Esperanto, inter kiuj estas bela, plurkolora muraĵo, varbanta efike por la foiro. Oni povas ricevi ĝin de: Nemzetközi Vasár, Bajcsy Zsilinszky ut. 25, BUDAPEST VI.

Sokol-kongreso, Praha 1948

Ĉi tiu grandioza gimnastika manifestacio okazos nunjare dum Junio kaj Julio. La Organiza Komitato eldonis belegan serion de poŝtkartoj kun teksto en Esperanto. La kartoj montras diversajn ekzercojn gimnastikajn kaj aliajn vidaĵojn. Interesatoj sin turnu al: Komitato de Sokol-kongreso, Narodni tr. 3, PRAHA, Ĉeĥoslovakujo.

Turisma materialo en Danujo

(1) La ĉefa dana ĵurnalo *Politiken* decidis ĉi-somere eldoni en Esperanto 64-paĝan dokumentaron *Faktoj pri Danlando* jam aperintan en pluraj lingvoj.

(2) Turista prospekto pri Danujo estas eldonata de Turista Asocio de Danujo.

(3) Turista prospekto pri Kopenhago estas eldonata de Turista Asocio de Kopenhago.

(2) kaj (3) estas riceveblaj senpage, sed nepre mendu ilin **sur apartaj kartoj aŭ leteroj**. La prezon de (1) oni komunikos poste. Apogu la laboron de niaj danaj samideanoj!

(2) kaj (3) estos haveblaj ĉe la jenaj adresoj:

(1) Turistforeningen for Danmark, Bernstorffsgade 8, Kopenhago V.

(2) Københavns Turistforeningen, sama adreso.

Interesa decido en Le Havre

Laŭ decido de la poliestro en Le Havre, Francujo, la policistoj lernas Esperanton. Multnombraj vojaĝantoj, kiuj uzas tiun gravegan *pordegon al Eŭropo*, povos do peti informon de la surstrate deĵorantaj policistoj. Oni memoru tion kaj en okazo de neceso, nepre uzu tiun servon.

Informo de la Kongreso Esperantista de Normandio

ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

La 32-a Universala Kongreso unuanime aprobis la planon de D-ro Székely, ke anstataŭ sporadaj propagandadoj komenciĝu laŭplana tutmonda propagando. Tial U.E.A. faras konstantan rubrikon en sia gazeto kaj petas ĉiujn samideanojn atenti la donatajn konsilojn.

15. La internaciaj kunvenoj ĉiuspecaj (kongresoj, konferencoj, foiroj, konkursoj k.t.p.) donas al ni tre valoran kaj facilan okazon por efika propagando kaj vera praktika laboro. Ni supozu, por ekzemplo, ke la tutmonda kuracistaro aranĝos sian kongreson en Parizo. Eksciinte tion:

16. La Franca Landa Societo tuj skribas leteron al la kongresa estraro kaj atentigas ĝin pri la signifo de Esperanto kiel ideala kongresa interkomprenigilo kaj proponas ke oni envicigu ĝin inter la uzeblajn lingvojn de la kongreso. Proponas la aranĝon de kursoj por la kongresanoj, en kiuj ili povos lerni la lingvon ĝis la tempo de la kongreso. Informas la estraron pri la Esperantlingva fakliteraturo.

Samtempe la Societo kunvokas siajn kuracisto-membrojn kaj alvokas ilin aliĝi al la kongreso kiel kuracistaj Esperantistoj.

La Societo raportas ankaŭ al U.E.A., kiu ankaŭ mem skribas al la kongresa estraro, kaj alvokas ĉiujn landajn asociojn Esperantistajn, ke tiuj kunvenigu siajn kuracisto-membrojn por la ĉi-supra celo.

17. La unuopaj Esperantistoj devas (a) aliĝi al la kongreso kiel Esperantistoj; (b) proponi la uzon de Esperanto al la kongresestraro; (c) fari prelegojn en la fakaj asocioj kaj verki artikolojn por la gazetaro pri la signifo de Esperanto en la tutmonda kuracista laboro kaj precipe en internaciaj kunvenoj; (e) kaj se la interveno de internaciaj Esperanto-organizaĵoj ŝajnas necesa, proponi tion.

Dum la kongreso ili devas fari fakprelegojn Esperantlingve, aŭ almenaŭ resumi la prelegojn en tiu lingvo.

18. Estas neforgesinde esprimi dankon post la kongreso al ĉiuj kiuj helpis kaj montriĝis favoraj por nia laboro.

Nova propagandrimedo

La grupo en Luzern, Svisujo, klopodis pri nova propagandrimedo. Konsciante, ke ankoraŭ multaj homoj ne scias, kio estas Esperanto, oni presigis faldeblan informilon kun nacilingvaj klarigoj pri la celoj de Esperanto. Tiujn informilojn oni akceptigis al ĉiuj kuracistoj en la urbo, por ke ili troviĝu en la atendejo, kie tre multaj homoj ilin legos. Imitinda ekzemplo.

Georges Agricola

LA PROBLEMO PRI LA D.P.-OJ

(D.P.=Displaced Persons=Ellokigitaj homoj)

Inter la problemoj kiuj atendas solvon estas tiu pri la rehejmigo de la militkaptitoj kaj la kreo de nova hejmlando por la D.P.-o. Per D.P. oni volas diri la centmilojn da senhejmuloj troviĝantaj plejparte en Germanujo, parte en Aŭstrujo. Temas pri homoj, kiuj perdis ĉion, hejmlandon, propran hejmon, kaj eble ankaŭ la kredon je la bono de la homo !

De kie venis ĉi tiuj homoj, la leganto demandas. Ili estas ekzilitoj ĉiuspecaj, forkurintoj el regionoj, kiujn la milito trapasis, forportitoj de la nazi-reĝimo kaj rifuĝintoj pro politikaj kaŭzoj. **Ili ja ne estas unu kategorio de homo**, kiel volas kredigi iu gazetaro.

Unu el la taskoj de la organizaĵo de Unuigitaj Nacioj (UNO) estas ĝuste la prizorgo de ĉi tiuj kompatindaj homoj el ĉiuj klasoj. Por ĉi tiu celo UNO starigis organizaĵon, la *Internacia Rifuĝula Organizaĵo*, mallonge I.R.O. La mono bezonata sumiĝas je 155 milionoj da dolaroj el kiuj 30 milionoj ankoraŭ mankas. Parenteze, ni rimarkigu, ke la elspezoj por *protekti* Grekujon kaj Turkujon sumiĝas je ne malpli ol 4000 milionoj da dolaroj. Kontrasto ! Sed temas nur pri 600,000 da D.P.-oj, kiuj ne havas elokventajn defendantojn kaj kiujn oni inklinas rigardi kiel ĝenajn petantojn.

La tasko konsistas en tio, trovi landojn, kiuj volos akcepti ĉi tiujn senhejmulojn. Nekontesteble ekzistas bezono pri laborkapablaj homoj, sed diversaj tre gravaj malhelpaĵoj ne progresigas la aferon. Unu el ili estas la manko de transportrimedoj. I.R.O. ne disponas je propra ŝiparo. En tiu rilato Britujo faris sian eblon, kaj sub la kuraĝiga devizo *Westward Ho* ! (Jen Okcidenten !) starigas organizaĵon kiu peras laborlokojn. Ĝis nun oni estas povinta peri pli ol tridekmil laborantojn, sed la brita bezono je laborforto ankoraŭ ne estas saturita. Malfeliĉe estas, ke en tia pure humaneca klopodo la antagonismo inter oriento kaj okcidento influas. Kiam temis pri translokigo de polaj kaj jugoslavaj senhejmuloj, la oriento tuj provis supozigi, ke estas intenco krei kontraŭ-komunismajn ĉelojn. Ĉi tiu malfido povis esti forigita nur post longa diskutado kaj fina interkonsento inter la interesitaj ŝtatoj.

Sed alia makulo malbeligas la penadon. Serĉante laboristojn precipe por la primitiva produktado, oni elektis el la tendaroj de I.R.O. la junajn kaj fortajn elementojn, sed rifuzis la kunvojaĝon de iliaj parencoj, ekzinoj, familioj.

Ĉi tiu nekomprenebla procedo kaŭzis netolerablajn kondiĉojn, ĉar I.R.O. devis sin okupi pri la postlasitoj. Fine la disiĝo de familioj montriĝis misfaro kaj tion oni jam decidis modifi.

Nova faktoro nun sin anoncas. La tendaroj de I.R.O. nur tre malrapide seniĝas je siaj loĝantoj. Ĝis fino de Oktobro pasinta oni povis trovi hejmojn por, rondcifere, 76,000 rifuĝintoj. Sed la nombro de la tendar-loĝantoj malkreskis nur je 32,000. La diferenco ne devenas de multaj naskiĝoj, sed rezultas el la konstanta alfluo de novaj forkurintoj el oriento kaj oni sin demandas hodiaŭ, kio okazos se al la nunaj 600,000 senhejmuloj venos sinsekve ankoraŭ pli kaj pli ? Cetere ekzistas multe pli da D.P.-oj, ĉar la oficiala statistiko rilatas nur tiujn en la tendaroj.

Lastatempe aperis libro kun titolo *Les migrations internationales* (la migradoj internaciaj) de unu el la sekciaj ĉefoj de I.R.O., S-ro H. A. Citroen. Ĉi tiu riĉe dokumentita verko konkludas, ke la politiko de enmigrado de la transmaraj landoj, bazanta sur ekonomiaj premisoj, estas falsa. La politika kiel ankaŭ la ekonomia situacio pravigas la urĝan alvokon, novreguligi la migradeblojn, kaj ne forgesi la humanecajn vidpunktojn. La okcidentaj landoj bezonas laborforton, ankaŭ Sud-Ameriko. Brazilo jam faris interkonsenton kun I.R.O. pri enlaso de senhejmuloj. La programo *Westward Ho* devus esti efektivigata laŭ vasta internacia skalo. Tio estus la solvo de la problemo. Tio finus gigantan problemon kaj grandegan homan mizeron. Kaj tio ne estus vana, ĉar ĝi kontribuos efike al la rekonstruo de nia ruinigita mondo.

Aforismoj

1. Nenion atendu de aliuloj, sed mem estu kompetenta en ĉio.
2. Nenion postulu de aliuloj, sed ĉion postulu de vi mem.
3. Ne atentu pri laŭdo, do akceptu ĝin kiam ĝi estas proponita.
4. Ne oferu vian animon al nekonatoj, sed estu bonanima antaŭ ĉiuj.
5. Ne atendu amon kaj indulgon de aliuloj, sed estu suno por ĉiuj.
6. Ne malŝparu tempon grumblante, sed donu mem bonan ekzemplon al la najbaro.

Esperantigis Gertrud Kilian.

REFORMOJ KAJ UNUECO

Rigardante malantaŭen en la historion de Esperanto, ni konstatas fenomenon, kiu ripetiga en preskaŭ ĉiu generacio. Tio estas la tendenco al ŝanĝo, al reformoj. La Bulonjaj fervoruloj eble agis pli prudente ol eĉ ili mem supozis, starigante la principon de netuŝblo rilate al la Fundamento de nia lingvo. Ni jam pretervivis la koncepton, ke netuŝblo estas ia sanktega afero, sed rezignante pri la sentimentala vidpunkto, ni devas tamen konfesi, ke sen tiu firma roko, la Fundamento—la bazo de nia tuta lingvo kaj uzado—verŝajne jam ne estus tiel firma kaj solida, ĉar la atakoj kontraŭ ĝi, faritaj plejparte de la *bonfarantoj* kaj *amikoj de Esperanto* certe estus kaŭzintaj dekon da skismoj en niaj vicoj.

Oni povas rigardi iomete indulge al la novulo, kiu kredas esti trovinta gravan difekton en la lingvo; preskaŭ ĉiu seriozulo inter ni siatempe havis la impreson, ke li estas pli saĝa, pli kompetenta kaj pli klarvida ol D-ro Zamenhof pri tiu aŭ alia punkto. Sed kun la tempo malgraŭ nia konvinko ke ni povus *plibonigi*, ni plilarĝigis nian horizonton, ni ekkonceptis la lingvon ne laŭ la limigita sperto, kiu estis nia, sed laŭ pli vasta perspektivo, kaj iom post iom ni venis al la konvinko, ke . . . eble Zamenhof estis pli prudenta, kaj ni iom tro aplombaj.

Tio estis la sperto de tre multaj el ni, kaj ni tial ne multe maltrankviliĝas pri tiaj sporadaĵoj, kiuj de tempo al tempo trudas sin sur nian kampon de agado, ĉu en formo de *plibonigoj*, ĉu en formo de tute nova lingvo-projekto. Ili estas kiel la misteraj ĉielaj korpoj, kiuj subite venas el la senlima spaco por momente ŝvebi en la regno de nia videbla universo donante strangan lumon en niaj noktoj, kaj jen . . . ili estas for, for denove en la malplenon, kaj neniuj plu pensas pri ili.

Ekzistas tamen alia speco de *reformanto* kies celo estas tute alia. Li ne estas simpla naivulo enpaŝanta sensperte. Tiu agas kun ruzo kaj laŭcela planado. Sub la preteksto esti *amiko* li insidas kiel vermaĉo en pomo, celante detrui la unuecon kaj la memfidon. Tiu ne paŝas sur la scenejon en plena taglumo kun honesta propono; tiu agas kaŝe, ĉe individuoj, rakontante mensogojn kaj malveraĵojn por prepari la grundon en kiun dissemi siajn perfidaĵojn.

Per la ago oni rekonas homon. Honestulo en tia afero povas uzi la liberan forumon de la Esperanta gazetaro; li povas sin turni al la landaj asocioj, al la Lingva Komitato, tiu supera instanco, kies tasko ĝuste estas, ekzameni tiajn aferojn. Se do, nia *reformemulo*, nia *amiko de Esperanto* ne nur ne sin turnas al tiuj publikaj institucioj, sed preferas kondukti izole, memstare, private, oni ne miru se honestuloj kaj prudentuloj

rigardas la *plibonigojn* kaj la tutan agadon kun suspekto.

En la nuna tempo diversaj projektoj de lingvo internacia aŭ estas maturaj por prezento aŭ estas en preparo. Esperantistoj ne bezonas timi tiujn *produktaĵojn de la lingvo-laboratorio*. Esperanto estas vivanta elprovita lingvo, praktike aplikata en ĉiuj sferoj de homa agado. Sed . . . se oni povus disspliti la fortojn de la Esperanto-movado, se oni povus dividi la movadon en diversajn, kontraŭajn kampojn, tio ja estus bela militstrategio! Tio estus tre matura momento por la trudado de konkurenca projekto! Konkurencon ni ne timas, sed ni ne estu tiel naivaj lasi nin delogi flanken per stulta *plibonigo*, kiu eble dividus nin, kaj lasus sur la internacilingvan terenon alian neproviditan projekton, kies malsukceso povus fari al nia afero neripareblan difekton.

Necesas memori la historion de Ido kaj pluraj aliaj projektoj, kiam temas pri *plibonigoj*. Sinkvaj reformoj en tiuj lingvoj tute detruis la fidon, kaj la adeptoj de la diversaj projektoj forlasis la aferon. Tio estis malbona ne nur por la koncerna projekto, sed ankaŭ por la ideo mem de lingvo internacia. Diversaj projektoj ekestis kun pretendoj, ke ili estas plibonigoj de Esperanto; iuj forigis la akuzativon, iuj forigis la supersignitajn literojn, iuj kiom eble konformis al la aspekto ekstera de okcidenta lingvo. Kie ili nun estas? La diversaj *plibonigoj* neniel rekomendis ilin al la mondo, kaj ili nuliĝis. Tio estu por ni la plej grava leciono en la nuna tempo, kiam reformemuloj dissemas siajn teoriojn inter niajn vicojn. Ni memoru la unuan lingvoskismon, tiun de la perfidanto L. de Beaufront. Post tiu provo plibonigi Esperanton, la seriozaj samideanoj jam ne sin okupas pri tiaj aferoj, sciante, ke ne tie kuŝas la solvo de nia propaganda problemo. Sed en niaj vicoj nuntempe staras multaj junuloj kaj novevenintoj, kiuj eble ne konas la historion de nia movado. Niaj malnovaj samideanoj do klopodu disvastigi inter la junularo la faktojn de nia ekzisto kaj akcentu la valoron de unueco en lingvaj, kiel ankaŭ en organizaj aferoj.

M.S.

Usono

Wisconsin estas unu el la ŝtatoj de Usono kie nia movado ne multe penetris. Danke al la senlaca klopodo de samideano Klukowski kaj kunlaboro de lokaj samideanoj, okazis kursoj kaj prelegoj en Beloit (en kolegio) en urbo Madison kaj en Milwaukee, kie samideano Klukowski prelegis en diversaj kluboj inter ili Rotario, kaj en Stevens Point, kie Direktoro de grava asekurkompaniaro ordonis presigi bildkarton kun Esperanta reklamteksto pri la nomitaj kompanioj.

BATALO INTER ANIMALOJ

De kiam ekzistas animaloj sur nia tero ili batalas inter si. Oni difinas tri specojn de animalo:

- (a) besto: vivanta estaĵo kapabla senti kaj movi sin, sed ne posedanta la racion
- (b) bruto: kvarpieda hejma paŝtobesto
- (c) homo: dumana mamulo, vertikale staranta, havanta inteligenton, racion kaj parolkapablon.

El ĉiuj animaloj, la homo estas la plej kruela.

En Hispanujo kaj Meksikio vivas animaloj, kies specialaĵo estas gajni monon per bovturmentado. Iliaj samspeculoj tre ĝuas iliajn pompajn prezentadojn, nomatajn *bovbataloj*, misnomo por bovturmentado.

Pasintan Aŭguston oni povis vidi sur la stratoj de Linares en Hispanujo, pompan kavalkadon en multkoloraj kaj belaj vestoj, kun la aso de bovmortigistoj ĉirkaŭata de sia gvardio de bovturmentistoj. Tiu parado iris al la granda amfiteatro, jam plenplena de homoj-animaloj, soifantaj la spektaklon de turmentado kaj mortigo de bovoj per specialistoj de tiu metio.

Kiam la kavalkado eniris la arenon, la ĉeestantoj ekstaze leviĝis kaj per multaj huraoj aklamis la bravulojn.

Post la plenumo de la ceremoniaj formalajoj la unua bovo estis pelata en la arenon. Ĝi rifuzis iri. Ĝi ne deziris batali. Homoj pelis ĝin per pikiloj. Vole nevole, la besto fine trovas sin sur la areno. Ĝi ne movas sin. Tio ne plaĉas al la hom-animaloj. Tiam incitisto flirtas antaŭ ĝiaj okuloj ruĝan mantelon por igi ĝin ataki lin. Li igas la bovon kuri post la mantelo dum longa tempo. Kiam la bovo estas jam lacega venas pikilisto por denove igi la bovon kuri. Sur ĉevalo, kiam la bovo kuregas al li, li lerte fiksas en la ŝultrojn de la bovo pikilojn ornamitajn per diverskoloraj rubandoj. Pro doloro, ellacigita, turmentita ĝis morto, la bovo iĝas furioza. Tiam venas la vico de la bovmortigisto ludi sian rolon. Al la amaso, estas li la ĉefa aktoro. Ĉiu volas vidi kiel li enpuŝos sian spadon en la nukon de la bovo. La varmsangaj hispanoj ĝuas la odoron de freŝa sango.

La bovo haltas . . . ĉirkaŭrigardas . . . kiel homo, kvazaŭ demandante "Kial vi kruele turmentas min?" Tiam venas aliaj bovturmentistoj, kiuj faras ĉiujn ruzojn al ili konatajn profesie por igi la bovon kuri denove, por peli ĝin al la spado kaŝita post la ruĝa tuko de la aso de bovmortigistoj. La bovo estas plene konscia pri sia tragika situacio. Kion ĝi faru? Ĝi estas

sola. Neniu por ĝi, ĉiuj kontraŭ ĝi. En la tago de ĉi tiu bovturmentado la mortigota bovo havis neordinaran kapablon rezoni. Kurante, ĝi tiel lerte turnis sin, ke la bovmortigisto ne sukcesis trafi per sia spado la mortigan lokon ĉe ĝia nuko. Ne estas sango! Per laŭtaj krioj la rigardantoj incitas la ason mortigi la bovon. Sed li atendas singarde. La ĉeestantoj senpacience kriaĉas al li insultojn kaj mokojn por instigi lin fari tion, kion li konsideras aŭ danĝera aŭ neebla; aŭ ĉu li estas hipnotigita de la rigardo de la bruto? La aso de bovmortigistoj, malgraŭ sia homa kapablo racie rezoni, ne retiras sin de la areno; lia reputacio estus makulita. La bovo restas aplomba . . . Ĝi rezonas . . . Kion la mortigisto ne povas fari per sia ŝtala armilo, la bovo sukcesas fari sen armilo. Ĝi enpuŝis siajn kornojn en la postaĵon de la aso. Tiu ne plu povis sin levi. Estis donite al la bovo fari agon de justeco antaŭ la publiko. Pro la vundo en la postaĵo la aso mortis.

La plej famaj bovturmentistoj en Hispanujo portis la kadavron de sia kamarado tra la stratoj kovritaj per floroj en Kordoba. Tie ĝi estis entombigita, meze de la plej spektaklaj honoroj iam viditaj en Hispanujo. La tago de la enterigo estis funebra tago tra la lando. Centmil funebrantoj flankis la stratojn de Kordoba; milita aviadilo flugis malalte kaj faligis milojn da ŝanĝe ruĝaj diantoj sur la ĉerkon.

Jen kio estas nekutima pri batalantoj. Oni faris grandan honoron al la venkito, sed nenian floron aŭ medalon al la venkinto.

Tra agonia silento, demandante kompaton kaj justecon, la bovo vokas: Ĝis kiam homoj permesos kaj ĝuos turmentadon de senkulpaj bestoj . . . ? Hodiaŭ turmentata mi; morgaŭ vi!"

E. E. Yelland

Turismo

Dum 1948 oni festos en Leuven-Louvain, Belgujo la 500-jaran jubileon de la kuŝigo de la unua ŝtono de la urbdomo. La festo daŭros intermite de Aprilo (Pasko) ĝis Septembro. La festo spegulos la artan kaj folkloran historion de la urbo kaj konigos al vizitantoj la kulturon de tiu malnova loko.

La sekretario de la Festkomitato interesiĝas pri eldono de prospekto en Esperanto kaj jam promesis, ke parto de oficiala broŝuro portos Esperantan tekston. Povas esti, ke instigo al la Turisma Fako portos rezultojn.

H.J.B.

La Estiĝo de viro

La bone ekvilibrigita viro estas antaŭ ĉio sociema. Lia vivo havas por li nenian sencon sen kunagado kun aliaj vivoj. Dum la juneco li havas kamaradojn, knabojn kaj knabinojn, sed precipe knabojn. Kune kun siaj knabamikoj li povas esti si mem, vivi en la estanteco; sed la knabino, kiu akompanas lin al balo, donas al li strangan sensacion de gajo. Apud ŝi li ŝajnas kreski super kaj preter sin, unuvorte, progresi. Dum lia plua kreskado unu knabino fariĝas pli necesa ol aliaj por la inspirado de liaj sindevigoj direkte al utila vivo. Propratempe li eksentas, ke la penso vivi sen ŝi estas doloriga, kaj ili fianĉiĝas. Edziĝo sekvas kiam li estas trovinta sian ekonomian medion.

Krome, li estas pace atakema. Ĉiuj liaj instinktoj puŝas lin al malkaŝita agado. Post diligenta serĉado kaj kiam li jam provis sian manon ĉe multaj aferoj, li trovas plaĉan okupon, plejofte okupon kiu donas al li la eblon fari multe da kontaktoj. Li donas sin al sia laboro pro la ĝojo plenumi ion kaj la ĝojo servi.

Li penas esti honesta antaŭ si kaj antaŭ aliuloj. Li rekonas sian kulpemon kaj provas ĝin ŝanĝi. Li ne hipokritas antaŭ sia familio nek antaŭ siaj amikoj ĉar li scias, ke lia feliĉo dependas de ties fido al li.

Tia viro provas kompreni sin kaj tiujn ĉirkaŭ li por ke li povu juste juĝi motivojn. Li rekonas, ke li faras erarojn pro impulsemo, kiujn li bedaŭras, kaj komprenas ke pri similaj kulpoj ĉe aliuloj li devas montri la grandanimon, kiun li atendas pri la siaj.

Li estas malavara. Li dividas sian enspezon kun sia familio, laŭ bezono. Kun la pligranda socio li porciigas tiom da sia havaĵo, kiom permesas lia vivnivelo, kaj kiom la bezonoj de elspezo pravigas. Li volonte donas da sia tempo por antaŭenigi veran demokration, per plibonigo de la socio, per la studado kaj instruado de metodoj por la kondukado de socia bonstato.

Laste, li estas humila. Bone konante la homajn malfortojn, li ne afektas superecon antaŭ aliaj, ĉu laŭ vidpunkto de moralo, ĉu laŭ tiu de socia aŭ ekonomia rango.

Francis H. Sumner, Oregon, Usono

Kampismo

Agadkampo por nia afero estas la organizaĵoj de kampismo. Dum la pasinta vintro kursoj okazis en Genève kaj Basel precipe por anoj de tiuj organizaĵoj. Ili estis tre sukcesaj.

La tempondoj

J. H. Erkkö

Tempondoj sen kompat' sin movas
kaj reĝas la tumulta bru',
malgrandan la gigant' forblovas,
konsol' al ĝi nenia plu.
Perfort' estingas la esperon
kaj fort' sovaĝa regas teron.
Ho, homarana rajto, pravo,
ve, kie estas via savo?

Kalevala popol', aŭtoro de kantoj,
vi, kiu suferojn eltenis etul',
ne estos vi inter la terenfalantoj
nun, jam en la aĝo de plenkreskul'.
Ilon vi portas ĉe via zono,
la fortoj kreskadas en ago-bezono,
el fundo de la varma kor'
de l' nov-mateno tonas ĥor'.

El finna trad. Vilho Setälä

(Kalevala : la epopeo de la Finna popolo. n.d.t.)

La luno

Ho Sfero

De homa destino

Tre ofte dum mia junaĝo

Mi iris image laŭ via lumvojo

Kaj kredis vin pala pro miaj amplenaj sopiroj.

La jaroj min jam liberigis el tiaj deliroj,

Kaj nun mi nur vidas, kun sama malĝojo,

La timon sur via vizaĝo

Por nia patrino,

La Tero.

Originale verkis

Brendon Clark, Nov-Zelando.

Por ĉiu estinta horo

unu memoro . . .

Por ĉiu estanta horo

unu feliĉo . . .

Por ĉiu estonta horo

unu espero !

Maria Letizia di Savoia-Aosta

Esperanto en lernejoj en Budapeŝto

Cent hungaraj parlamentanoj subskribis leteron adresitan al la ministro de instruado, D-ro Gy. Ortutay, por esprimi dankon pro permesordono pri nedeviga instruado de Esperanto en la ĝeneralaj lernejoj, kaj por peti similan permeson pri ĉiuj hungaraj mezlernejoj.

En la hungara financministerio oni fondis novan kurson kun 20 lernantoj. Malferme parolis ŝtatsekretario Vasady-Kovács kaj subtenis S-roj Berceli kaj Sas.

33-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Malmö, 1948



Kvara Listo de Kongresanoj

812. F-ino O. Samuelsson, Bohus-Malmö, Svedujo
813. S-ro Erik Karlsson, Vetlanda, Svedujo
814. S-ino Anna Vestberg, Västerås, Svedujo
815. F-ino Anna Dahlgren, Sundsvall, Svedujo
816. S-ro Nicolo La Colla, Torino, Italujo
817. S-ino Adriana La Colla, edzino
818. S-ro Vito La Colla, filo
819. S-ro J. Gilliard, Neuveville, Svisujo
820. S-ro L. Kynčl, Praha, Ĉeĥoslovakujo
821. F-ino R. Nilsson, Traryd, Svedujo
822. S-ro J. Toller, Strömsnäsbruk, Svedujo
823. S-ro G. C. Vermandere, Antwerpen, Belgujo
824. S-ino H. Schoofs, Antwerpen, Belgujo
825. S-ro Tousseyn, Jabbeko, Belgujo
826. S-ino E. Hojtasch, Bruxelles, Belgujo
827. S-ro J. R. Van Eynde, Wilrijk, Belgujo
828. S-ino A. Van Eynde, edzino
829. F-ino R. Deneef, Wilrijk, Belgujo
830. D-ro T. Van Gindertaelen, Mechelen, Belgujo
831. S-ro E. Cortvriendt, Bruxelles, Belgujo
832. F-neto B. Anjér, Oslo, Norvegujo
833. S-reto J. Anjér, Oslo, Norvegujo
834. S-reto S. Anjér, Oslo, Norvegujo
835. S-ro H. Halik, St. Pölten-Spratzern, Aŭstrujo
836. S-ro L. Strobl, St. Pölten-Spratzern, Aŭstrujo
837. F-ino S. Berggren, Sundsvall, Svedujo
838. F-ino M. Hanzalová, Praha, Ĉeĥoslovakujo
839. F-ino A. Fryšová, Praha, Ĉeĥoslovakujo
840. S-ro A. R. Tancredi, Genova, Italujo
841. S-ro Tancredi, Genova, Italujo
842. S-ro S. J. Bruce, Wembley Park, Britujo
843. S-ino Bruce-van der Graaf, edzino
844. F-ino M. E. Wagland, Sheffield, Britujo
845. F-ino H. Liebeck, Cape Town, Sud-Afriko
846. F-ino E. M. Taskinen, Helsinki, Finnlando
847. S-ro K. Huuskonen, Helsinki, Finnlando
848. S-ro O. Lehtivaara, Helsinki, Finnlando
849. S-ino S. L. Lehtivaara, edzino
850. S-ro K. Lehtivaara, filo
851. S-ro R. Slot, Zeist, Nederlando
852. S-ino A. M. Slot-van der Meulen, edzino
853. S-ino G. H. Martin-van der Giessen, Zeist, Nederlando
854. S-ro A. Rejtö, Budapest, Hungarujo
855. S-ino A. M. Rejtö, edzino
856. F-ino H. Bisgaard, Skillingaryd, Svedujo
857. S-ro O. Sandkvist, Kinnared, Svedujo
858. S-ro B. Jönsson, Malmö, Svedujo
859. S-ino G. B. Jönsson, edzino
860. S-ro U. A. Räsänen, Lappeenranta, Finnlando
861. S-ino Saara Oras, Helsinki, Finnlando
862. S-ino S. Oras, Helsinki, Finnlando
863. S-ro P. Mäkelä, Helsinki, Finnlando
864. S-ino M. Mäkelä, edzino
865. S-ro O. Martelius, Helsinki, Finnlando
866. S-ino I. Martelius, edzino
867. S-ino T. Suikkanen, Helsinki, Finnlando
868. D-ro G. Crippa, Milano, Italujo
869. S-ro Frank Johansson, Stockholm, Svedujo
870. S-ro L. Andersson, Höje, Svedujo
871. S-ino K. Andersson, edzino
872. S-ro O. Frode, Göteborg, Svedujo
873. S-ino T. Frode, edzino
874. F-ino D. Andersson, Linköping, Svedujo
875. S-ro J. Hellqvist, Falköping, Svedujo
876. S-ro Folka Wejbro, Malmö, Svedujo
877. S-ro R.v.d. Kley, Den Haag, Nederlando
878. F-ino G. de Bruin, Den Haag, Nederlando
879. S-ro A. J. Beckers, Overpelt Fabriek, Belgujo
880. S-ro G. H. Burdekin, St. Helens, Britujo
881. S-ino J. A. Martin, Whiteway apud Stroud, Britujo
882. S-ro H. Penfold, London, Britujo
883. S-ro T. H. Ridpeth, London, Britujo
884. S-ro W. A. Walker, Gloucester, Britujo
885. S-ino A. E. Walker, edzino
886. F-ino M. A. Walker, filino
887. S-ro T. J. Footman, Birmingham, Britujo
888. S-ino M. A. Footman, edzino
889. F-ino R. S. Footman, filino
890. D-ro N. Juringius, Ängby, Svedujo
891. S-ino G. Tistad, Karlskoga, Svedujo
892. S-ro J. Silhan, Podgórze-Krakow, Polujo
893. S-ino M. Silhan, edzino
894. S-ro B. D. Sokolov, Sofio, Bulgarujo
895. S-ro J. Strnad, Breclav, Ĉeĥoslovakujo
896. S-ino A. Högstedt, Stockholm, Svedujo
879. F-ino M. Jannes, Linköping, Svedujo
898. S-ro B. Svensson, Fröseke, Svedujo
899. F-ino B. Adolfsson, Hälsingborg, Svedujo
900. S-ro G. S. Johansson, Norrköping, Svedujo
901. S-ro M. D. Lapierre, Saint-Maur, Francujo
902. S-ino R. Lapierre, edzino
903. S-ro J. M. Tible, Saint-Dié, Francujo
904. S-ino G. M. L. Tible, edzino
905. S-ro R. Blanc, Sancoins, Francujo
906. S-ino A. Blanc, edzino
907. F-ino R. M. Oikkonen, Helsinki, Finnlando
908. F-ino A. L. Olsson, Kristianstad, Svedujo
909. S-ro S. Zeilhofer, München, Germanujo
910. D-ro M. Bánó, Budapest, Hungarujo
911. S-ino I. Bánó, edzino
912. F-ino K. V. Bánó, filino
913. S-ro M. Mitrovátz, Budapest, Hungarujo
914. S-ino M. Mitrovátz, edzino
915. S-ro L. Csillag, Budapest, Hungarujo
916. S-ino R. Reich, Budapest, Hungarujo
917. S-ro E. Markovitz, Budapest, Hungarujo
918. S-ro V. Lörinczi, Budapest, Hungarujo
919. S-ro E. Meijer, Nacka, Svedujo
920. S-ino N. Meijer, edzino
921. S-ro E. Dahlmann, Berlin-Frohnau, Germanujo
922. F-ino I. Dahlmann, filino
923. F-ino A. Sjöström, Malmö, Svedujo
924. F-ino M. Sjöström, Malmö, Svedujo
925. F-ino A. G. Winberg, Uddevalla, Svedujo
926. S-ro Allan Andersson, Uddevalla, Svedujo
927. F-ino Wera Andersson, Uddevalla, Svedujo
928. F-ino Eva Bengtsson, Göteborg, Svedujo
929. S-ro D. Lönn, Eksojö, Svedujo
930. S-ino S. Nordling, Hagaström, Svedujo
931. S-ro P. Elgander, Älgerås, Svedujo
932. S-ino A. Sutcliffe, Ashton-under-Lyne, Britujo
933. S-ro A. Diaz Chapartegui, Caracas, Venezuelo
934. S-ro J. Pinto do Carmo, Rio de Janeiro, Brazilo
935. S-ino A. T. Pinto do Carmo, edzino

936. S-ro A. Cseh, Den Haag, Nederlando
937. S-ro M. Mattle, Oberriet, Svisujo
938. S-ro A. Messelier, Neuilly-Plaisance, Francujo
939. S-ro R. Curnelle, Marcq-en-Baraeul, Francujo
940. F-ino M. Milde, Sundsvall, Svedujo
941. F-ino E. Jansson, Sundsvall, Svedujo
942. F-ino B. Ohlsson, Malmö, Svedujo
943. S-ro M. Carlsson, Kulladal, Svedujo
944. S-ro G. Norling, Uppsala, Svedujo
945. S-ino M. Norling, edzino
946. F-ino H. Zackrisson, Linköping, Svedujo
947. S-ro S. Szabad, Älvsjö, Svedujo
948. S-ino J. Szabad, edzino
949. S-ro K. Szabad, Somcuta-Mare, Rumanujo
950. F-ino J. T. Grunberg, Boulogne-sur-Seine, Francujo
951. S-ro J. Gibaux, Sanvic, Francujo
952. S-ro H. Laforest, Chalon-sur-Saône, Francujo
953. S-ro A. Andersen, København, Danujo
954. S-ro P. A. Glygaard, København, Danujo
955. S-ro G. Katzianka, Wien, Aŭstrujo
956. S-ro C. Mauritz Andersson, Uppsala, Svedujo
957. S-ro O. Juhlin, Hamburgsund, Svedujo
958. S-ro K. Öhrn, Arbrå, Svedujo
959. S-ino E. Isaksson, Koskoskulle, Svedujo
960. S-ro I. Ekström, Turku, Finnlando
961. S-ro K. Virkki, Helsinki, Finnlando
962. S-ro I. Rinne, Kajaani, Finnlando
963. S-ro A. Larsson, Näsviken, Svedujo
964. S-ro A. Blom, Gävle, Svedujo
965. S-ro S. Forsstén, Uppsala, Svedujo
966. S-ro B. Nordahl, Malmö, Svedujo
967. S-ino A. Persson, Malmö, Svedujo
968. S-ro E. Hult, Arvika, Svedujo
969. S-ino L. Hult, edzino
970. S-ino A. Abrahamsson, Borlänge, Svedujo
971. F-ino G. Lindesson, Ljungbyhed, Svedujo
972. F-ino G. Nilsson, Klippan, Svedujo
973. S-ro A. Anderson, Eskilstuna, Svedujo
974. S-ino G. Anderson, edzino
975. S-ro V. Karlsson, Eskilstuna, Svedujo
976. S-ro E. Brink, Uppsala, Svedujo
977. S-ro E. Karlsson, Vilshult, Svedujo
978. F-ino S. Tinmark, Skövde, Svedujo
979. F-ino L. Vikström, Stockholm, Svedujo
980. S-ro G. Andersson, Åmotfors, Svedujo
981. S-ro M. Grafström, Fivlered, Svedujo
982. F-ino R. Andersson, Stockholm, Svedujo
983. F-ino A. Ljungberg, Stockholm, Svedujo
984. F-ino T. Sigurd, Axvall, Svedujo
985. S-ro G. Dismark, Fritsla, Svedujo
986. F-ino G. Nilsson, Hälsingborg, Svedujo
987. S-ro A. Norén, Sölvesborg, Svedujo
988. S-ro E. Malmkvist, Smedslätten, Svedujo
989. Rezervita
990. S-ro S. Jönsson, Hohög, Svedujo
991. S-ino E. Jönsson, edzino
992. S-ro A. Blaauwbroek, Den Haag, Nederlando
993. S-ino B. Blaauwbroek, edzino
994. S-ro A. J. Mayer, Wien, Aŭstrujo
995. S-ino G. Mayer, edzino
996. S-ino A. E. Mortensen, København, Danujo
997. S-ro G. Beverloo, Gorinchem, Nederlando
998. F-ino M. Rossi, Cordenons, Italujo
999. F-ino A. Rossi, Cordenons, Italujo
1000. S-ro G. A. Swanson, Warner Robins, Georgia, Usono
1001. S-ino Swanson, edzino
1002. S-ro J. Skalicky, Vejprty, Ĉeĥoslovakujo
1003. S-ro G. Vassio, Torino, Italujo
1004. S-ro L. Birindelli, Torino, Italujo
1005. S-ro G. W. Sjöholm, Helsinki, Finnlando
1006. S-ro A. Ljubotskij, Luukkaa, Finnlando
1007. S-ro J. N. Mikkola, Helsinki, Finnlando
1008. S-ro M. Juutilainen, Tampere, Finnlando

1009. S-ro N. Noponen, Tampere, Finnlando
1010. S-ro A. A. Mehtonen, Oulu, Finnlando

STATISTIKO

de la kongresanoj			
Svedujo ..	550	Hispanujo ..	3
Britujo ..	111	Brazilo ..	3
Francujo ..	87	Jugoslavujo ..	3
Norvegujo ..	71	Ĉilio ..	2
Finnlando ..	50	Sud-Afriko ..	2
Danujo ..	41	Argentino ..	1
Ĉeĥoslovakujo ..	27	Aŭstralio ..	1
Nederlando ..	27	Egiptujo ..	1
Svisujo ..	24	Portugalujo ..	1
Hungarujo ..	19	Rumanujo ..	1
Belgujo ..	18	Venezuelo ..	1
Italujo ..	14	Trieste ..	1
Germanujo ..	13		
Usono ..	8		1,097
Bulgarujo ..	7	Rezervitaj	19
Aŭstrujo ..	6		
Polujo ..	4	El 29 landoj	1,116

Universala Kongreso de Esperanto, Malmö Grava Anonco

La 33-a Kongreso en Malmö decidis doni sumon de 100 svedaj kronoj kiel premion (eventuale pli ol unu) al tiu(j) persono(j) ekster Svedujo, kiu(j) aperigos la plej grandan kaj plej bonan artikolon pri Esperanto kaj la 33-a Universala Kongreso en naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La artikoloj estu rigardataj nur el reklamvidpunkto. Kondiĉo estas, ke oni menciu la kongreson en Malmö. La gazetoj kun la Esperanto-artikoloj devas atingi la Esperanto-kongreson, Malmö, antaŭ 20.7.1948, kun surskribitaj nomo kaj adreso de la artikol-aperiginto kaj informo pri la eldonnombro de la gazeto. Aro da artikoloj plibonigos la ŝancojn.

33-a Kongreso de Esperanto.

Esperanto en la komerco

Sekve de la komunikoj aperintaj en nia revuo pri la asocioj *Esperanto en la Komerco* kaj *Internacia Komerco-Unio* S-roj R. Levin kaj M. M. Lourenço de Gouveia de la respektivaj organizaĵoj, petas nin sciigi, ke ambaŭ asocioj harmonie kunlaboras por disvastigi la uzadon de Esperanto en la komercaj medioj.

La karaktero de ambaŭ asocioj estas iom malsama: I.K.U. estas unuigo de komercistoj, kies agentoj traktas negocojn kaj ricevas procentaĵojn, dum E.K.K. celas interrilatigi komercajn firmojn per Esperanto, sed ne intervenas en la negocoj mem.

La asocioj ne estas inter si konkurencaj sed kontraŭe povas tre utili unu al la alia. Komercistoj petu informojn de S-ro Richard Levin, Propaganda Fakestro, Foire de Lyon, Rue Menestrier, LYON, Francujo; S-ro M. M. Lourenço de Gouveia, Rua das Dificuldades 28, FUNCHAL, Madejro.

ENIGMA KONKURSO N-ro 27

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, BRUSSEL-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 25.

N-ro 57 : Horizontale oni legas : konservativa, obeiteamodat, neglektirevu, glavetokoket, liti-bajoneto, osiouraganoj, mkvarantenos, eoazos-turnok, repertuaroli, avenoialatee, tipoklientoj, otareottorso.

N-ro 58 : Se la juvelisto malfermas la kvar ĉenerojn de unu ĉenpeco li povas kunigi per ili la kvin aliajn pecojn. La kliento do pagas 40 frankojn.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 23-a konkurso : S-ro P. Brunet (Franc.) 106p., S-ro E. Schmitt (Franc.) 104p., S-ro J. Soyeur (Belg.) 102p. (lote).


Enigmo N-ro 61 : Ciferenigmo. La tuto konsistas el 112 literoj kaj enhavas peton al ĉiuj solvantoj.

37-73-40-94-70	simbolo de venko
49-102-1-22-64	prepozicio
57-75-59-3-111	mangebla riverfiŝo
96-65-46-5-45-70	dentskrapulo vivanta sur arboj
30-103-24-25-75-10	malgrandulo
62-21-28-77-78-83	ano
34-15-67-35-90	okazas post la masonado
11-66-48-92-88	muzikilo
43-58-107-98-63	okazas en la dormo
112-17-91-4-26	monato
101-33-80-54-79	uzata por ŝtopi matracojn
68-104-13-19-69	babili dissemante malicaĵojn
74-39-41-56-86-51	troviĝas en fabrikoj
44-53-84-87-50	signo de ĝojo
60-105-82-81-52-26	malriĉa dometo
16-71-42-15-97	faras la simioj
31-47-93-18-99	tia estas paperfolio
9-20-55-108-2-38	samaspekti
76-36-27-72-23	postuli ke oni liveru komercaĵojn
68-59-8-87-39	deklivo tia estas danĝera
100-61-109-29-37-111	instrumento por fari tabulojn
32-85-89-72-26	komuna vorto por alfluo kaj refluo
110-95-80-2-51	mezurunuo de longo
12-7-14-6-50-10	angla grenbrando
101-78-106-55-63-58	esperas ricevi la solvantoj
34-58-54-12-83-112	esperas ricevi mi

Ekspozicio en Londono

Dum 5-12 de Junio okazos en Ealing, (Londono W.5) granda ekspozicio sub titolo *Arta kaj Civita Semajno* ĉe kiu la lokaj Esperantistoj disponos pri senpaga stando. Leteroj kaj ĝazetoj estas urĝe bezonataj por montri al la loka Konsilantaro la efikon de nia lingvo. Tuj sendu gratulleterojn kaj gazetojn al John C. Sutcliffe, Esq., Public Relations Officer, Town Hall, EALING, London, W.5, Anglujo. Oni uzos la leterojn kaj gazetojn sur la budmuroj por montri al la miloj da vizitantoj la intereson, kiun vekis la ekspozicio. Aŭfranku filatele kaj uzu glumarkojn multnombro! Premio por la plej bela sendaĵo.

Enigmo N-ro 62 : Magiaj kvadratoj



Plenigu la ĉi suprajn kvadratojn tiel, ke vi legas en ĉiu kvadrato tiel horizontale kiel vertikale samajn vortojn aŭ vortradikojn. Por plenigi la maldekstran suban kvadraton uzu la literojn : a - a - e - e - i - i - i - i - l - l - l - l - l - n - o o - o - o - p - p - s - s - v - z - z. Por plenigi la aliajn kvadratojn uzu la vortojn aŭ vortradikojn : amara - aperi - aromi - avino - balen - eniri - erara - galop - imagi - kares - latun - limit - lojal - notis - orumi - palis - panik - regal - silab - silik.



Imitinda Ekzemplo

Ni volonte volas fari aludon pri la ĵus finita kurso de S-ino Kaminska en Ĝdansk, Polujo. Ĉiuj tridek unu kursfinintoj estas membroj de U.E.A. ! Ke ĉiuj kursgvidantoj tiel instigu la lernantojn ! Gratulon !

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 205

5an de Aprilo 1948

Novaj Aliĝintaj Asocioj.

Flandra Ligo Esperantista
Kroatia Esperanto-Ligo
Slovenia Esperanto-Ligo

Novaj Kunlaborantaj Organizaĵoj.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio
Kristana Esperantista Ligo Internacia

DELEGITOJ

La plimulto de la jenaj informoj alvenis tro malfrue por la nova jarlibro, nun presata.

Brazilo

Alagoinhas. D : C. de Souza Cunha, Rua 24 de Outubro 12.

Finnlando

Särkisalo. D : Esko Kyöstilä, Instruisto.

Germanujo

Bochum-Laer. D : A. Peters, Eulenbaumstr. 144, (21b) Bochum-Laer.

Svedujo

Åmotfors. D : G. Andersson, Brl. 170.

Falun. D : E. Ström, Stenslund, Box 1190, Falun.

VD : V. Bonde, Stenslund 1107.

FD (Filatelo) : E. K. Aspenström, Box 4950.

FD (Libro-bindado) : La VD.

Malmö. FD (Stenografio) : O. A. Nilsson, Hantverkaregatan 12.

Strömsnäsbruk. D : J. Nilsson, dentisto.

Usono

Mattoon (Illinois). D : S-ino S. E. Harris, 63 Wabash Avenue.

PATRONOJ 1948

20. S-ro N. Wooding, Leicester, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

251. Kapt. R. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo
252. S-ro Th. Engebretsen, Oslo, Norvegujo
253. S-ro H. E. Dillinger, Placerville, Cal., Usono
254. S-ro H. R. Hansen, New York, N.Y., Usono
255. S-ro D. Stephens, New York, N.Y., Usono
256. D-ro K. Maier, Tientsin, Ĉinujo
257. S-ro G. Soares de Araujo, Rio de Janeiro, Brazilo
258. D-ro L. de Azeredo Coutinho, Belo Horizonte, Brazilo
259. S-ro A. Caetano Coutinho, Rio de Janeiro, Brazilo
260. D-ro C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo
261. S-ro I. Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo
262. S-ro R. F. Latimer, London, Anglujo
263. F-ino E. Berry, Haslingden, Anglujo
264. S-ro F. O. Bevan, Farnborough, Anglujo
265. F-ino I. M. Cochrane, Dunfermline, Skotlando
266. Pastro H. Dawtrey, Horsham, Anglujo
267. S-ro E. B. Foreman, Nottingham, Anglujo
268. S-ro P. L. Gill, London, Anglujo
269. S-ro W. A. H. Haines, London, Anglujo
270. F-ino A. G. Macfarlane, Glasgow, Skotlando
271. S-ro M. Pearson, Sheffield, Anglujo
272. S-ro C. Pot. Az., Slikkerveer, Nederlando
273. D-ro O. Damsté, Hilversum, Nederlando
274. S-ro G. J. D. Dijsselynck-Bral, Terneuzen, Nederlando
275. S-ro H. Huisjes, Jr., Gasselternijveen, Nederlando
276. S-ro B. E. Parker, Beckenham, Anglujo

277. S-ro D. P. Boatman, Westcliff-on-Sea, Anglujo
278. S-ro H. Dodson, Willaston, Anglujo
279. S-ro S. W. Hicks, Bayswater, Okcidenta Aŭstralio
280. Prof. T. Gwiazdowski, Sosnowiec, Polujo
281. S-ro R. Wroblewski, Gdansk, Polujo
282. S-ro D. Ouwehand, Den Haag, Nederlando
283. S-ro W. M. P. J. Holzhaus, Amsterdam, Nederlando
284. D-ro A. Halbedl, Knittelfeld, Aŭstrujo
285. D-ro E. Wüster, Wieselburg, Aŭstrujo
286. S-ro R. Ligneaut, Orléans, Francujo
287. F-ino E. de B. Daly, Okehampton, Anglujo
288. S-ro W. Heap, St. Annes-on-Sea, Anglujo
289. S-ro A. Bloemendal, Deventer, Nederlando
290. S-ro M. J. Gaio, Rio de Janeiro, Brazilo
291. S-ro A. Wantuil de Freitas, Rio de Janeiro, Brazilo

DONACO por helpi al la kosto de la petskribo : Avoto 6ŝ. 3p.

DONACOJ al la ĝenerala kaso : E. S. Maude 2ŝ. 6p., G. L. Preedy 15ŝ., W. F. Lambert 5ŝ., F-ino E. Kay 10ŝ., J. D. Applebaum 5ŝ., V. F. H. 6p., F-ino E. de B. Daly 5ŝ., E. J. Williams 2ŝ. 6p., J. Bosch 5ŝ., S-ino A. V. Morris 30ŝ., A. F. Doneis 10ŝ., Wm. A. Knox 5ŝ., J. Leahy 5ŝ., S. W. Hicks 4ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Atentigo—En dissendita cirkulero, S-ro R. M. Frey en Vieno anoncas ke projektita vojaĝo lia havas la subtenon de U.E.A. La Estraro de U.E.A. deziras informi, ke S-ro Frey agas propriniciate, kaj ne petis, nek ricevis, formalan aprobon de nia Asocio.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de Marto 1948, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1947 :

	1947	1948
Asociaj membroj ..	4126	3986
Individuaj membroj :		
MJ	732	640
MA	3883	3656
MS	251	291
Patronoj ..	20	20
DM	109	162
HM	20	55
	5015	4824
	9141	8810

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

ESPERANTISTA VIVO

Niaj Mortintoj

Nilsson—S-ro Martin Nilsson mortis la 8-an de Marto 1948 en Örebro, Svedujo, 79-jara. Malnova pioniro.

Obuŝtarov—Ĵeko Kirilov Obuŝtarov, mortis 28-an de Marto en Elhovo, Bulgarujo. Delegito de U.E.A. kaj fervora samideano.

Vila-Freixas. Oni informis nin pri la morto de Hispana samideano, S-ro Vila-Freixas, en Parizo, la 23an de Marto. Ĉar li ne havas familianojn en Francujo, liaj korespondantoj bonvolu noti tion.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Nederlanda instruistino, 52-jara, deziras korespondi kun instruistino en Malmö aŭ ĉirkaŭaĵoj. F-ino C. Zorgdrager, Betonweg C 247, Amerongen, Nederlando.

Lens-aj grupanoj aranĝos letervesperon en Junio. Sendu amase novaĵojn. Certe respondos. Skribu al la sekretario, A. J. Bayard, 9 rue de Laon, Sallaumines (P. de C.), Francujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos. S-ro Louis Obzchaneck, 9 Avenue Parmentier, Fontenay-s-Bois (Seine), Francujo.

12 liceanoj deziras korespondi kun gejunuloj de tutmondo. Liceo de Poniatowski, Pl. Inwalidów 10, Warszawa, Pollando.

Tri ĉefaj amikoj, 20-jaraj, rakio-teknikistoj, volas korespondi kun tuta mondo. K. Mucha, Palackého 1018/3, Chomutov, Ĉeĥoslovakujo.

Vespero de leteroj, bildkartoj, kaj Esperantaj gazetoj. Sendu al Pierre Berger, 114 avenue Joseph Abras, Belgrade, (Namur), Belgujo.

VIVO DE ZOLA

Aŭgusteno de Silva

Tradukita de M. de Freitas

106 paĝoj, broŝ. 3ŝ., afranko 3p. (13 rpk.)

“Oni povas senti dankon al la tradukinto, ke li prezentis al la internacia legantaro tiel bonan biografion, ne nur por refreŝigi la memoron pri Zola, sed ankaŭ por atentigi al ni la makulojn en nia homa socio, kiuj ankoraŭ—bedaŭrinde—estas tre aktualaj.” M.S. en *Esperanto Internacia*.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉu vi jam legis la problem-romanon,

D-ro DORNER?

Se ne, aĉetu kaj legu ĝin nun!! Ĉie oni pridiskutas ĝiajn problemojn!! Partoprenu ankaŭ vi la pridiskuton!

“... la verko estas interesa kaj vigla... Nur fakulo estas kompetenta kritiki la sciencan bazon de la verko... —*Esperanto Internacia*.

“... Rimarkinda verko pri arta gravedigo...”

... La aŭtoro evidente posedas tute sufiĉan fantazieron de romanverkisto—eĉ pli ol sufiĉan—tiel streĉe kaj romantike li scias gvidi la temon...

... se la libro aperus en nacia traduko, ĝi certe estus al sia eldononto brila sukceso.—

Suomen Socialdemokratti.

Broŝ. 8 ŝil., afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA BELAJ GLUMARKOJ

de UEA estas denove haveblaj

Verda kaj arĝenta

100 por 9p. (3 rpk.) afrankite



TATRA—ŝaŭmigilo, la pulvoro, el kiu vi facile, simple kaj tuj preparos bongustan, dolĉan, ŝaŭmetantan TRINKLIMONADON. Mendu skatolon, kiu enhavas 35 porciojn kun recepto en Esperanto. Kontraŭ antaŭpago 15 rpk. aŭ egalvaloro ekspedas ĝin rekomendite:

JAROMÍR PAVLACKÝ

Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Se vi deziras pagi aliamaniere (per Esperantaj libroj, varoj, k.t.p.), petu senpagan prospekton. Liverebla en la tuta mondo. (Nur en Germanujo mi ne havas provizore liverpermeson).

POR VIA DISTRO

PREMIAJ ROMANETOJ

La libreto entenas 23 mallongajn rakontojn, kiuj estis premiataj en literatura konkurso. La romanetoj, tre diversaj en temo kaj stilo, estas originale verkitaj en Esperanto. Pro la interesa enhavo kaj bona lingvo la libro tre taŭgas kiel ekzerca legaĵo por kluboj, studrondoj, kaj perfektigaj kursoj.

La Praktiko, Marto 1948.

96 paĝoj, broŝurita, oportuna por la poŝto aŭ la mansaketo.

Prezo : 2ŝ. 6p., afranko 2p. (11 rpk. afrankite).

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LIBROJ EL SVEDUJO

VIVO VOKAS

Originale verkita de

STELLAN ENGHOLM

Bind., 180 paĝoj, 9 ŝil., afranko 6p.

KVARA RAPSDIO

Redaktis **FERENC SZILAGYI**

Enhavanta artikolojn kaj poemojn de multaj
bone konataj aŭtoroj

Broŝ., 48 paĝoj, 3 ŝil., afranko 2p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo